1a JARO, No. 3 - Novembro 1953.

# LA MODERA VOĈO de INDONEZIA U.E.A

PINTU BESI 39. DJAKARTA

INDONEZIO

---

Djakarta, 15 - 11 - 1953.

## LA U.E.A. KONGRESO EN ZAGREB

Dum la lasta semajno de Aŭgusto okazigis en Zagreb la 39a Kongreso de la U.E.A. Zagreb estas la ĉefurbo de la respubliko Kroatujo, kiu ree estas membro de la federacio-respubliko Juguslavujo.

Ĝi estas la tria kongreso, kiun mi vizitis kaj mi devas diri, ke ĝi estas la plej bone organizata, kvankam ĝi okazigis en nova lando kie oni estas ankoraŭ konstruanta.

La akcepto de la multaj gastoj estis ekstreme agrabla, dum la enloĝigo kaj la helpo al eksterlandanoj estis bonege organizata. La kongresanoj sentis sin kiel honorataj kaj amataj gastoj, ĉar la loĝantoj de la tuta urbo agis afable kun ili kaj estis helpemaj. En la antaŭaj kongresoj, kiel kongresano oni nur estis numero.

La stacidomo, la tramoj kaj kelkaj konstruaĵoj estis ornamataj per la esperantflago, dum laŭlonge de vojoj per verdaj kaj blankaj sagetoj la direkto al kongresdomo estis klare indikata. En Zagreb oni tute interesiĝis je la kongreso, tiel ke la sento estante membro de "unu granda familio" estis vere klara kaj granda.

La kongreso mem ankaŭ staris sur alta nivelo, unue tial eminentaj viroj kiel Profesoro Privat ĉeestis. El la vesperoj de belaj artoj, la akceptoj, la popoldancoj ktp. estis klare evidenta la granda zorgo dediĉata al tiu ĉi kongreso. La gastigantoj kaj gastigantinoj sub gvido de la eminenta prezidanto, Doktor Ivo Berovic, neniam estis laca interbabili kun la gastoj, alparoli ilin kaj kontentigi iliajn preferojn. D-ro Ivo Berovic estas ideala viro por konstruanta lando. Inteligenteco, kuraĝo kaj entuziasmo estas bezonataj por venki multajn malfacilaĵojn en nova lando.

Por indonezia Esperant-movado estas multa interesiĝo. Ĉiuflanke venis petoj por rakonti ion pri ĉi tio kaj pri adresoj por la korespondado. La reprezentanto de Unesco, S-ro Lebar, kiu ĉeestis en la kongreso, ankaŭ demandis interesplene pri la progreso de la Esperanto en Indonezio.

(Ch. Sj. Datoe Toemenggoeng)

## KONGRES U.E.A. DI ZAGREB

Pada achir minggu bulan Agustus di Zagreb telah diadakan Kongres U.E.A. jang ke 39. Zagreb adalah ibu kota Republik Kroatie, jang mendjadi anggauta Federasi Republik Jugoslavia lagi.